


ESPERANTO JUNAS EN FRANCO



Jeun Espéranto

info 

Magazine de l'association JEFO

JEFO informas • Trimestriel • Septembre-novembre 1999 • n° 99/3 • 25 FRF

• ISSN : 265 3853 • Commission paritaire n°61005 • Supplément à Franca Esperantisto • Dépôt légal à parution •



* IJK = Internacia Junulara Kongreso

www.esperanto.org/jefo

**Tout
savoir
sur J@fo**

JEFO

JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO

JeunEspéranto-France

4bis, rue de la Cerisaie
75004 PARIS
www.esperanto.org/jefo
ou ttt.esperanto.org/jefo

Direktoro de la eldono /
Directeur de la publication :
Karine Texier

Redaktorino / rédactrice :
Ludivine Delnatte

Desegnoj / illustrations :
Ludivine Delnatte

Fotokopiado kaj sendado /
Photocopie et envoi :
Laurent Vignaud

Kontribuis al tiu numero /
Ont contribué à ce numéro :

Yves Bachimont
Marc Bavant
Alain Fagot
Haritz Ferrando
Catherine Giangrossi
Alexandre Kadar
Didier Loison
Ugo de Maubeuge
Maryvonne Robineau
Rose Sanz
Rozenn Texier-Picard

Dankon al ĉiuj !

Fotokopiita komence de septembro je 300 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO kaj ricevi regule tiun bultenon, plenigu kaj sendu la aliĝilon en la centraj paĝoj.
La artikoloj en *JEFO-informas* reliefigas la vidpunktojn de ties aŭtoroj, ne nepre tiun de JEFO.
Tamen JEFO permesas al si la rajton publikii aŭ ne tiujn artikolojn.
Represajoj estas permesataj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de la aŭtoro kaj ke JEFO estu informita.

Photocopié début septembre à 300 exemplaires. Pour adhérer à JEFO et recevoir régulièrement ce bulletin, remplissez et renvoyez le bulletin d'adhésion situé en pages centrales.

Les articles parus dans JeunEspéranto Info n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de les publier ou non. Tous droits de reproduction autorisés sous réserve de l'indication de l'auteur et de la source et sur simple information à JEFO.

ISSN : 265 3853

Le mot de la présidente

Bonjour, salutons !

L'Espéranto se porte bien et nous aussi ! L'été a été très actif et fructueux : après le week-end gourmand "Olive", certains étaient au Congrès Mondial de Berlin, d'autres au Congrès International des Jeunes en Hongrie et d'autres encore au stage sur l'action régionale à Paris. Et quelques mordus ont tout fait !

Vous y étiez parfois pour la première fois, parfois pour la 6ème parce que vous êtes des inconditionnels ! Mais une chose est sûre : sur toutes les photos, je n'ai vu que des visages joyeux et enthousiastes...


Certains d'entre vous ont raté cette occasion unique de se faire des amis, de découvrir de nouvelles cultures, de partager un mode de vie différent. Sachez que vous pourrez vous rattraper lors des prochains week-ends gourmands, pendant la semaine de réflexion de TEJO à Strasbourg (fin octobre) et surtout venez vivre le passage à l'an 2000 en espéranto pendant le prochain Internacia Seminario (IS) à Wetzlar en Allemagne. Je vous rappelle d'ailleurs que vous pouvez bénéficier pour cet IS du service exclusif de Espéranto-Jeunes : le paiement de l'acompte en francs français.

Pour tous renseignements, usez et abusez de l'adresse : jefo@esperanto.org.

Et si vous n'avez pas internet, utilisez l'adresse et le numéro de téléphone de vos coordinateurs régionaux !

Jéfoment vôtres,

Karine



ENVOYEZ
VOS
CONTRIBUTIONS
AVANT LE :
10/11/99
MERCI !

ENHAVO

Vorto de la prezidanto	2
Enkonduko	3
UK-Raporto	4
IJK-Raporto	6
Vojaĝo	8
Oliva Semajnfino	10
Aliĝilo	11
Jefo Butik'	13
Anoncoj	15
Informo	16
Glitkurado	17
Legado	18
Korespondpetoj	20
Kalendaro	21
Adresaro	22

Enkonduko

Salut à tous,

Ah !... Comme il est difficile de se remettre au travail après un été de folie ! (C'est pourquoi ce numéro de *JeunEspéranto Info* est un peu en retard - et je m'en excuse).

Cet été, quelques-uns ont décidé d'aller faire un tour du côté de Berlin (où avait lieu le Congrès Mondial, avec pas moins de 3000 espérantophones). Parmi eux, Alex, un nouveau qui, comme d'autres "komencantoj", est rentré chez lui, ravi. Lisez son compte-rendu et ses impressions page suivante !

Quant aux autres, ils sont allés en masse en Hongrie, où a eu lieu la plus grande rencontre de jeunes espérantophones de l'année (plus de 650 participants venant d'une quarantaine de pays). Regardez les photos page 7, vous êtes peut-être dessus ! (Cependant la rédaction n'est pas responsable de l'air que vous avez sur la photo !!!) et lisez le compte-rendu de Haritz, un catalan très charmant, qui

participait lui aussi pour la première fois à une rencontre d'espéranto.

Au passage, je vous rappelle que vous avez le droit, vous aussi, de contribuer à *JeunEspéranto Info* et pas seulement en envoyant des comptes-rendus de rencontres !

Quant au reste du contenu de ce numéro, je vous laisse le découvrir seuls, sinon, il n'y aura plus de surprise.

Bonne lecture

**Et n'hésitez plus :
Participez à une rencontre
de jeunes espérantophones,
vous ne serez pas déçus !!!**

Ludivine

PS : Vous avez dû recevoir le numéro de *Koncize* 2/99, dans lequel se trouve une petite enquête. Vous avez, par mégarde, oublié d'y répondre. Ce n'est pas grave ! Mais pensez quand même à l'envoyer le plus rapidement possible. Merci !



Acompte en francs français pour l'inscription aux prochains congrès :

Un service exclusif pour les membres d'Espéranto-Jeunes.

dates	rencontre	pays	date-limite de réception des chèques	gain par rapport au prix sur place	montant du chèque
27 déc 1999 3 jan 2000	Internacia Seminario	Allemagne	23 nov 1999	60 DEM	167,69 FRF

Envoyer les bulletins d'inscription aux ORGANISATEURS et les chèques à l'ordre de ESPERANTO JEUNES à Didier Loison, 45 rue Verrerie, 21000 Dijon



Alekso en la UK

Ĉar mi promesis al Ludivine, la estonta eksredaktorino de Jefo Informas, jen mi donas al vi mian raporton pri la UK. (Elparolu france "ouko"). La tiel nomata 84a UK, tio estas Universala Kongreso (de Esperanto) estis mia unua Esperanta renkontiĝo. Tiurilate mi kore dankas Karine, Olivier, Laurent kaj precipe Alain, kiu ĝiris mian pagon senkoste rekte al la Centra Oficejo de UEA¹ en Roterdamo. Dank'al tiuj homoj mi unue aŭdis pri la Kongreso kaj konvinkigis ke mi devos partopreni kaj due povis aliĝi, kvankam mi faris tion la lastan momenton, tio estas en julio. Mi aparte multe interesiĝis pri ĉeesti la UK-on ĉar Berlino estas la urbo kie mi esperantistiĝis antaŭ 9 monatoj.

UNUAJ KONSTATOJ

Mi senprobleme iris en Berlinon, ĉar mi jam multfoje iris tien, dum mi studis tie. Mi flugis el Parizo al Munkeno, poste el Munkeno al Berlino. Mi alvenis sabaton, la 31an de julio, ĝustatempe por la "Interkona Vespero". La

kongresejo estas tute fama : ĝi estis la "Internacia Kongres-Centro", atingebla metroe, buse aŭ "S-Bahne"². Verdire mia unua impreso estis malĝoja. Fakte mi konstatis ke la plejmulto de la ĉeestantaj esperantistoj estas maljunaj homoj ! La kongresejo aspektis iomete kiel klubo por maljunuloj ;-). Feliĉe la tria-aĝuloj povas esti ege interesaj kaj ankaŭ estis junuloj. Ĉiukaze neniam antaŭe mi vidis tiom da esperantistoj. Kaj tio estas bonega aĵo ☺

En la ĉefa halo estis multaj **budoj** : budoj por la aliĝintoj, informbudo pri la urbo, budoj por la ĵurnaloj, junulara budo, budo por la ekskursoj ktp. Tuj mi montris ĉe la aliĝ-budo mian UEA-atestilon kaj ricevis belan dokumentujon (portantan la oficialan UK-desegnon reprezentan la Pordegon de Brandenburg super la verda stelo), kiu enhavis multe da dokumentoj. Kelkaj estis eĉ interesaj ;-), ĉefe la Kongresa Libro, tio estas la oficiala programo kun klarigoj pri la prelegoj kaj interesege la adresaro de ĉiuj, kiuj aliĝis antaŭ la limdato. Do mia

nomo ne estis ene. ☹ Tamen ĝi estis tre utila por rekontakti la renkontitajn homojn, post la UK...

LINGVO

Dimanĉon estis la "solena inaŭguro". Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj venis por aŭdi la eminentulojn de UEA kaj la prezidantojn de la landaj sekcioj. Tiel parolis 65 esperantistaj prezidantoj el la tuta mondo ! Kaj rimarkinde, ĉiuj esprimis sin pere de la sama lingvo, neniu bezonis tradukiston aŭ traduk-kaskojn ☺ Verdire mi eble estus bezoninta tradukon, ĉar mi kvazaŭ nenion komprenis ;-). Bonŝance mi havis du ĉarmajn sidnajbarinojn, nome Mirjam kaj Ludivine, kiuj fakte nenion tradukis. Sed la solena inaŭguro tiel estis pli agrabla. Plie ankaŭ estis dancspektakloj.

Dum la kongreso mi kompreneble plifluiĝis Esperante. Ĉar mi ne nur krokodilis aŭ aligatoris aŭ kajmanis. Mi ankaŭ multe parolis kaj ĉefe aŭdis la Internacian Lingvon. Mi lernis kelkajn interesajn novajn vortojn, ekzemple "maltrafi" (vidu ĉe "Prelegoj"), la utiliga "etosoj", "plenumi", "alkutimiĝi" ktp. Do por ĉiuj, kiuj ŝatus lerni agrable, mi konsilas : partopreni internacian Esperantan renkontiĝon !

PROGRAMEROJ kaj PRELEGOJ

Al mi plaĉis precipe :

- la **ekspozicio** en la "Deutsche Guggenheim", nomata "**Amazonen der Avant-Garde**", temanta pri rusaj pentristinoj de la komenco de la jarcento. Tie estis krom mi la nederlanda Dmitri, la



germanaj Melanie kaj Mirjam, la rusa Tatiana, la hispana Susana kaj la francaj Emilie kaj Ludivine. La pentraĵoj estis strangaj sed belkoloraj.

- la koncerto de "Persone", la plej bona kaj fama nuna Esperanta rok-grupo, el Svedio. La muziko plaĉis al mi multe. Kaj la etoso estis tre "varma".

- la ĵazkoncerto de "Tango Toj" ĉe la lernejo

- la koncerto de "Ĵomart kaj Nataŝa", du kantistoj kiuj esperante kantas belajn dolĉegajn kantojn, inter ili multaj pri amo.

Tiuj kvar programeroj estis partoj de la Junulara Programo.

- la **Internacia Arta Vespero** : ĝi okazis vendredon, la 6an de aŭgusto. Ĉi-tiu foje mi komprenis preskaŭ ĉion. ☺ Pluraj artistoj prezentis tion, kion ili estis preparintaj dum la kongresa semajno, t.e kantoj, muziko, danco (precipe amuze estis Kim, kiu prezentis la saman dum IJK), ĥoro, re-kanto, re-muziko ktp.

- la "prelego pri la suneklipso" : mi ne povas komenti ĝin detale ĉar bedaŭrinde estis tro multaj ĉeestantoj kompare alla sid-kvanto. La prelego estis refarata, sed mi maltrafis ĝin. Onidire tiu-ĉi prelego estis tre interesa. Mi alparolis la israelan preleganton post la prelego. Sed mi vidis tiam ke li ne volis multe pli paroli pri la suneklipso. Tio estas komprenebla :li parolis dufoje pri tio.

- la "Nitobe-simpozio" : ĝi estis ege interesa. Fakte ĝi estis seminario pri lingvo en la angla kaj Esperanto, ĉar kelkaj prelegantoj estis neesperantistoj. Pro tio ĉiuj aŭskultantoj ricevis traduk-kaskon por la angla, la germana kaj Esperanto ! Nur por tiu malofita okazo aŭdi Esperantan tradukon per kasko, mi ĝojis partopreni la simpozion. Per turno de la butono eblis aŭdi la germanan tradukon, poste la Esperantan tradukon, fine la anglan paroladon.

- la "esperantologia konferenco" kaj la seminario "Lingvoj en In-



terreto" ankaŭ estis interesaj, rilate al la uzata lingvo aŭ eĉ al la enhavo mem.

FINVORTOJ

☺ Eĉ se ne estis multaj junuloj kompare al la maljunuloj, eĉ se la Junulara Programo estis tre multekosta – sciante ke la plejmultaj programeroj estis senkostaj, eĉ se ankoraŭ restas kelkaj kritikpunktoj, mi konsideras ke la 84a UK de Esperanto en Berlino estis por mi bonega sperto, pro sekvaj kialoj :

☺ la jam menciitaj **programeroj** (koncertoj, ekspozicio, konferencoj ktp).

☺ la plej granda Esperanto-aranĝo en la jaro – pli ol 2700 homoj el 65 landoj – estas impona.

☺ la kongres-urbo, **Berlino**, kiu kvankam ne aparte belega, estas ege interesa kaj vivanta.

☺ Berlino, unuafoje, fariĝis **esperantista urbo**. Neniam antaŭe mi hazarde renkontis en urbo tiel multe da esperantistoj, rekoneblaj pere de siaj nomŝildoj.

☺ utila por **plibonigi mian kapablecon pri Esperanto**, la amika lingvo. Post unu semajno, oni komprenas, oni povas esprimi sin, oni ne plu estas komencanto !

☺ kelkaj **konversacioj Esperante**

kun francoj, daninoj, germanoj, norvegoj, italo ...

☺ la plej granda esperanta **Libroservo** en Esperantio, kie troveblas multegaj – pagendaj - esperantaj libroj, kasedoj, poŝtkartoj, vidbendoj ktp.

☺ la certo ke mia dua esperanto aranĝo, nome la **IJK** en Veszprem (9a ĝis 16a de aŭgusto), estos ankoraŭ pli bona. Fakte IJK plaĉis al mi pli ol UK ...

Konklude mi konsilas al vi : **PARTOPRENU LA UK** .La sekvanta okazos en Tel-Avivo ! **NE MALTRAFU LA OKAZON !** Kaj **VIZITU BERLINON**, la ĉefurbon de Germanio kaj plej vivantan urbegon el Eŭropo !

Alexandre

☐ UEA = Universala Esperanta Asocio

² la "S-Bahn" estas pli-malpli la germana "RER", rapida surtera urbotaĵo.



Mia unua IJK

Unu monaton post la Internacia Junulara Kongreso 1999 en Veszprém, Hungario, mi rememoras tiun neforgeseblan sperton, parte ĉar estis mia unua IJK kaj ankaŭ mia unua internacia renkontiĝo en Esperantio. Certe multe da legantoj komprenos miajn sentojn.

Jam ses monatojn antaŭe, miaj samideanoj de KEJ, Kataluna Esperanta Junularo, en Barcelona, Hispanio, parolis al mi pri la agadoj kaj etoso, kiujn oni trovas dum la internaciaj kongresoj. Preskaŭ ĉiuj jam partoprenis iun pasintan IJK-on. El nia loka asocio ĉeestis ok membroj en la IJK'99, sed mi ja aranĝis min por ne tro krokodili kun ili. Kvankam mi pensas ke la IJK devas esti vivata, ne rakontata, mi klopodos sekve rakonti miajn spertojn.

Post longa trajnvojaĝo mi atingis kaj partoprenis en la dezirata kongreso. Kvankam oni devis multe atendi por aliĝi la unuan tagon, mi rimarkis, ke la

Loka Kongresa Komitatano (LKK) organizis ĉion bonege. Inter esperantistoj el almenaŭ tridek kvar landoj, mi finfine trovis okazon por praktiki senlime la internacian lingvon. Post la atendado, mi konatiĝis kun miaj samĉambruloj : ni estis do kvar viroj el Nederlando, Hungario, Litovio kaj Hispanio.


Dum la semajno oni havis la eblecon partopreni en diversaj agadoj : tagaj aŭ duontagaj ekskursoj al belaj kaj interesaj urbetoj ĉirkaŭ la fama lago Balatono ; prelegoj pri multaj temoj ; kursoj ; kaj tiel plu. Mi kutime preferis, malgraŭ la belega hungara pejzaĝo, resti en la kongresejo kaj "salti" tie de unu agado al la alia.

Inter multaj interesaj kunvenoj mi ĉeestis en unu, kie kuniĝis esperantistoj el Sudfrancio kaj Nordhispanio por paroli pri kunlaborado dum la venontaj respektivaj agadoj. Eĉ por mi estis okazo por koni

Esperantistojn el aliaj hispanaj regionoj, kiel Madrido kaj Eŭskio. Ankaŭ mi multe ŝatis kaj lernis en la kunveno de la Asocio de Esperantistaj Verduloj (AVE), ĉar mi ja estas aktiva verdulo en mia urbo. Ni parolis pri la plej veraj mediaj problemoj en niaj landoj - ofte estas la samaj- , ankaŭ pri la ideo disvastigi Esperanton inter la verdaj grupoj en niaj landoj kaj eksterlandlime. Fakte Esperantistoj kaj Verduloj, ne nur havas komune la saman farbon ! Finfine, alia tre interesa kunveno estis la TEJO-Kunveno. Tie mi konatiĝis kun la TEJO-Teamo kaj eksciis pri ĝiaj funkcioj kaj pri la venontaj seminarioj. Pri la IJK'2000 en Hong-Kong mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi povos iri, sed almenaŭ mi nepre klopodos iri tien.

Kion plian mi povas skribi ? La interesaj homoj, kiujn mi renkontis kaj la bonaj geamikoj, kiujn mi faris al mi ; la koncertoj ; bambumadoj ; kaj aliaj ne rakontebaj momentoj... Sendube mi pensas, ke la IJK aŭ aliaj internaciaj renkontiĝoj estas tre taŭgaj por interŝanĝi ideojn kaj senti sin en la granda senlima ideolando, kio estas Esperantio.

Haritz



BUDAPEST

Foto : la Parlamento de Budapeŝto (ĉefurbo de Hungario), kiun ni vizitis dum la tuttaga ekskurso.

Vojaĝo al IJK 1999




*Dum olimpiaj ludoj,
Francoj bone reprezentis nian landon...*



*VESZPRÉM,
agraba
malgranda
urbo,
gastigis
IJK-n
anstataŭ
Zanka.
Sed Lago
Balatono ne
estis tre for.*



VESZPRÉM




*Kia bona pozicio por spekti
eklipson!*



*Junuloj el Francio
ĉiam ĝuis la bonan etoson...
Nun estas famaj la "francaj broŝetoj" kiuj estis
ofte videblaj por intermasaĝoj, interaplaŭdoj,...
dum IJK kaj UK 99.*

*JOMO kaj la
Liberecanoj
koncertis dum
pli ol 3 horoj
post la
neatendita
koncerto de
Amplifiki kaj
dancigis
freneze ĉiujn !*



Ok jaroj da nomadismo ĉirkaŭ la mondo (tria parto)

Vous vous souvenez ? Dans le précédent numéro, vous avez pu lire un résumé du livre de Maryvonne et Bruno Robineau, relatant leur voyage de 8 ans autour du monde, avec l'es-péranto dans leur bagages.

Actuellement, Maryvonne et Bruno sont en Roumanie. Néanmoins, par leurs notes de voyages, vous allez pouvoir ci-dessous connaître un peu mieux la vie des aborigènes en Australie.

AŬSTRALIO : Reveno al la tero de revado

Kelkaj aborigenoj revenas al siaj praavaj teroj. Jen veto por tiuj forlasitoj de l'historio kaj de la aŭstralia blanka socio.

La vilaĝo Tennant Creek ŝajne dormas sub la varmo. Vagas sur la stratoj kelkaj nigrhaŭtaj viroj kaj virinoj, kun tre malgaja mieno, se ne mortebriaj. Naŭdek elcentoj de la aborigenoj el Tennant Creek senlaboras.

Ni rapide forlasas la asfaltan vojon. Post okdek

kilometroj da ruĝa tero, ni alvenas al ses kabanoj el onda lado. Ili formas la aborigenan komunumon de Kalumpulpa, kien ni venas partopreni en projekto pri plantado de arboj. Antaŭ ses jaroj, la maljuna Harry enmigris kun sia klano al tiu-ĉi tero, kiu estis ilia antaŭ la alveno de la blankuloj. Ses familioj vivas ĉi-tie, kune kun kelk-trideko da skabiaj hundoj.

Ĉi-matene, la virinoj iras serĉi tuberojn. Gladys klarigas ĉiujn viv-rimedojn de la veprejo, al ni, kiuj ne vidas ion manĝeblan ĉi-tie kaj rapide mortus pro malsato en tiu duondezerto. "Ni trovas tuberojn kaj, laŭ la sezonoj, sovaĝajn fruk-



Foto : Dum la viroj ĉasas la grandajn animalojn, la virinoj serĉas radikojn, berojn, insektojn kaj rampulojn manĝeblajn

tojn, prunojn, figojn... Vidu, ĉi-arbe troviĝas mielo. Ni, virinoj, ĉasas la etajn bestojn, la laceritojn..." El nia plukado ni kunportas plurajn manĝeblajn radikojn kaj dikajn vermojn, blankajn kaj grasajn. Laŭdire frandaĵo, proteine riĉa ! Ĉi-tage la komunumo pompe festenas. La viroj alportis belan kanguruon kiu rapide eniĝas en la fornon fositan rekte en la tero kaj kovritan per braĝoj.

Por ĉasi kanguruon, emuojn kaj sovaĝajn meleagrojn, la viroj anstataŭigis la bumerangon de siaj praaŭoj per fusilo. Kaj por kompletigi la veprejan menuon, la virinoj temp'al'tempe iras al la superbazaro de Tennant Creek. Ĉu pro tio ili perdis sian kulturon ? Ne, plu restas la sankta rilato kun la naturo kaj iliaj praaŭoj, la kundividemo interne de la klano.

La vivo de aborigenoj baziĝas sur la spirita ligilo kiun ili flegas kun la tero. Por ili, ĝi ne estas posedebla. Ili estas parto de ĝi. Ili respondecas pri ĝi, ĝi estas ilia animo kaj ilia vivo. En Kalumpulpa, la klano de la maljuna Harry do retrovis sian teron tie, kie radikas ĝia kulturo kaj ĝia digno, tie, kie iliaj praaŭoj travivis la "tempon de revado".

Sed necesas mono por pagi la fusilon, la veturilon, la instruadon de la infanoj...

Demando al la maljuna Harry : "Kiel vi povas perlabori iom da mono en tiu veprejo, por ne tro dependi de la asigno por senlaboruloj ?"

"Ah ne zorgu virineto -li ĉiam nomis min tiel- Mi scias elturniĝi. Ĉi tie oni povas havi etan bredobienon. Ni ĉiuj laboris kiel vakeroj, kaj estas multaj sovaĝaj bovoj, kiujn ni kunigas por okupiĝi pri ili."

Ili ankaŭ ekkultivas malgrandajn legom-ĝardenojn kaj bre-

das kelkajn kokinojn. Ĉiuj semsaketoj estas videble ŝutitaj samloke kaj kunpremitaj unuj kontraŭ la aliaj, la tomato-plantaĵoj nur malfacile kreskos. Oni ne transformiĝas de ĉasisto-plukisto al terkulturisto en unu tago. Neniu gvidas ilin. Sed ekzistas volo elturniĝi, provi sintezon inter du mondoj. Volo i.a. konkretigita per la decido de la maljunuloj forigi alkoholon el la komunumo. Ĉiujn aborigenajn familiojn trafas tiu plago.

Side sur polvo, ni konversacias kun la virinoj. Ni montras niajn familiajn fotojn kaj ili lernigas al ni kelkajn vortojn el siaj lingvoj. Kvar ili parolas : la warlmanpa, la warlpiri, la warungu kaj la anglan. Sufiĉe bone por homoj, kiujn multaj rigardas primitivoj ! La virinoj scivole demandas : "En kiu direkto estas Francio ?" Ne facilas, ja, konkretigi la vojon por iri de Kalumpulpa, meze de la aŭstralia veprejo, al Saint Pierre-Montlimart, mia naskiĝvilaĝo, ie kuŝanta en la franca kamparo !

Maryvonne Robineau



Et, si vous voulez en savoir plus sur leur aventure, n'hésitez pas à commander leur livre, pour voyager avec les mots, pour rêver des

horizons qu'ouvre l'espéranto (c'est également un très bon cadeau pour des non-espérantophones !)

(préciser "en français / en Esperanto") "Et leur vie, c'est la terre - Huit ans de nomadisme autour du monde" - "Ili vivis sur la tero - Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo".

240 pages - 8 pages de photos couleurs

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno Robineau - FR-49270 Landemont
Tel-Fax +33 (0)2 40 98 78 76 -
Bruno.Robineau@wanadoo.fr

120 FRF + frais d'envoi : 20 FRF
(France) - 30 FRF (aliaj landoj)

Kial mi esperantistiĝis

"Mi delonge sciis ke Esperanto ekzistas. Antaŭ eble kvar monatoj, mi ne sciis ke oni vere parolas ĝin.

Mi interesiĝas pri florumanĝado. Iun tagon, mi legis paĝon pri florumanĝado. Tiu paĝo haveblis ne nur angle, sed ankaŭ Esperante. Mi ridegis. Mi pensis ke manĝi florojn estas normala, sed paroli esperanton estas ridinda. "Mi iĝis scivola. Mi volis lerni pli pri esperanto. Nur iomete pli poste mi volis lerni Esperanton. Hodiaŭ mi parolas Esperanton kaj la floroj jam velkis.

Mi aldonus ke mi volis lerni Esperanton por kontroli ĉu ĝi vere estas kvarfoje pli facila ol aliaj lingvoj.

Mi ankaŭ volas vojaĝi per Esperanto.

Tomaso (Usono)

<http://ourworld.compuserve.com/homepages/thos/esperant.htm>

OLIVA SEMAJNFINO

Olivoj , suno kaj maro

De la 25a ĝis la 27a de junio okazis en Maury (Maŭri) apud Perpignan (Perpinjan) la 11a gastronomia semajnfino.

Ĝi estis organizata de la plej simpatiaj geamikoj de suda Francio : Coralie kaj Frédéric.

23 frandemuloj partoprenis la... lavadon de la teleroj.

Plej agrable pri la semajnfino laŭ mi estis ke ni vivis ĉiam je la Hispana horo ! t.e. tute tre malfrue :

Ni forveturis vendredon matene el Parizo je la 12a kaj 1000 km pli malfrue ni alvenis finfine ĝuste por la vespermanĝo je la 23a !.

Sabate matene, vizitado de Tautavel-pragoto, kaj pramuzeo tre moderna... Olivmanĝado je la 14a, kaj poste vizitado de la regiono ĉirkaŭ Collioure je la ... 18a ! (la 18a estis ĝuste la posttagmezo-manĝo por ni). Ni banis nin en Mediteraneo apud Argelès, ni ludis pilkon, vizitis la vilaĝon Collioure, kaj finfine ni "kafeis, teis, ĉokoladis, kaj alkoholis".... antaŭ reveno al la lernejo de Maury.



Post la vespermanĝo, je la 23h30, Marina montris al ni kiel oni devas danci la "Sardana"-n, kiu estas folkloro kataluna danco. Post la Sardana, kompreneble okazis diskoteko.

La sola problemo estis ke mi pasis multajn horojn por trovi diversajn variantojn de la bambo por surbendigi ĝin... kaj mi forgesis la kasedon en mia domo en Parizo !!! (Tio neniam plu okazos, nun la kasedo estas en mia dorso-sako !).

Dimanĉe matene vekiĝo tre frue, je la 9a per laŭta muziko, sed ne klasika, kiel dum la printempa...

Matenmanĝo sen olivoj, poste vizitado de la Katara Kastelo Queribus, kaj vizitado de la fama vilaĝo de Cucugnan (Kukunjan)* Kiu ŝatas Alphonse

Daudet bone memoras la legendon de la pastro de Kukunjan. Tio estis verkita de Georges MIR, kiu kreis la maksimumon per malmulta prezo ĉar francreclamo diras : "ETA MIR ! ETA PREZO ...SED ĜI FARAS MAKSIMUMON !"


La etoso estis tre agrabla : Krom... Vi absolute ne devas diri la Hispanojn sed la Katalunojn ! Kial ? Mi diros same kiel Laurent : "Hispanio estas provinco de Katalunio, ĉu ne ?" :-)

Nur grava problemo okazis pri la bonfamo de la suda regiono : La suno kaŝiĝis dum la tuta renkontiĝo. :- (. Mi ne sunbruliĝis :-)

Céline promesis ke ŝi ne plu ludos kun siaj lernantoj futbalon antaŭ la venonta gastrosemajnfino, ĉar estis tre malfacila marŝi por ŝi, kun ŝia rompita piedfingro. Dankon al ĉiuj kiuj subtenis ŝin dum la promenadoj. :-) :-)

Mi aŭdis paroli pri ... Paella-semajnfino en His... ne en Katalunio. Espereble ĝi okazos baldaŭ, kaj oni dancos Sardanojn, Rok, kaj Bambon. "OLE !"

Ni finis la semajnfino, lundon "je la 5a matene alvenante hejme", kaj rapide irante al laboro por dormi iomete....



Rose



Espace Culturel International



Un espace multiculturel
Un centre d'information sur les langues
Un bar associatif

...Plén de boissons originales...

Des musiques du monde...

...À des prix associatifs...

Des soirées débats...

...Dans une ambiance conviviale

Mille et une langues

(Association loi 1901 à but non lucratif)

14, rue Leynaud 69001 LYON • Tel : 0472 07 75 49

kotopo@esperanto.org • www.esperanto.org/internacia/kotopo


CCP "Mille et une langues" : 11 000 12 N LYON

P

S

K

K



NEJ kaj FLEJA invitas vin al sia ĉe-plaĝa:

PSKK

ejo «De Aalscholver», en Nieuwpoort (BE)

22.10.1999 (17h00) ĝis 24.10.1999 (16h00)

Maro: Jes, la maro estas apenaŭ 100 m for de la renkontiĝejo!

Programo: Kion vi pensas? La maro proksimegas... Krome ni antaŭvidas ekskurson al fama belga plaĝurbo Oostende.

Atingo: Prenu ekzemple trajnon al Oostende, kaj de tie vi iras per laŭplaĝa tramo al haltejo Nieuwpoort-Bad. Sekve piedu 200 m al la ejo.

Kunportindas: La kutimaĵoj: muzikiloj, ludoj, kantaroj, muzikkasedoj, fotoj, naĝokostumo, bela vetero (aŭ pluvvestaĵo), bonaj ŝuoj, bona humoro.

PSKK: Post-Somera Klaĉ-Kunveno. Plej Senenua Klaĉ-Kunveno. Plenetosa Stranda Klaĉ-Kunveno.

Programme

- **1^{er} octobre à 20h** «*l'importance d'être Aimé*» Pièce de théâtre d'Oscar Wilde jouée en espéranto.
- **9 octobre à 19h30** Soirée russo-ukrainienne. Repas ukrainien suivi d'une présentation du russe.
[Repas : 80 FRF, réservation jusqu'au 7 octobre au KoToPo]
- **15 octobre à 20h30** «*Le chinois, des idéogrammes à la langue phonétique*», conférence de Wang Zhixiong
- **22 octobre à 20h30** Conférence sur la langue internationale espéranto
- **23-24 octobre** Stage d'initiation à l'espéranto
- **29 octobre à 20h30** «*Le persan et les poètes afghans*», conférence de Mohamad Kacem et Saraj Kokcha
- **du 2 nov. au 2 déc.** Exposition : Christian Desmurs, peintre et sculpteur
- **5 novembre à 20h30** «*La perception des éclipses dans les différentes cultures*», conférence de Christophe Lanier
- **19 novembre à 20h30** «*Les langues mayas hier et aujourd'hui*», conférence de Bin Tun
- **17 décembre à 20h30** «*Le quechua, langue des Indiens des Andes*»,
conférence de Pascale Amey. Possibilité d'initiation à la langue quechua par la suite.

Les conférences sont gratuites pour les membres de l'association (adhésion annuelle usager : 10 F)

- Cours de tibétain **un mardi sur deux à 18h30** à partir du 21 septembre, avec Djangchoup Gyurmé.

**...et bien sûr nos ouvertures hebdomadaires
les mardis, mercredis et jeudis de 18h à 22h**

↓ kotizoj kaj kondiĉoj

La plena kotizo estas 1750 BEF.

Haveblaj (kaj adicieblaj) rabatoj:

- 100 BEF por malpli ol 30 jaraĝuloj,
- 400 BEF por malpli ol 16 jaraĝuloj,
- 100 BEF por membro de landa esperanista junularo (NEJ, FLEJA, ...),
- 100 BEF por antaŭpago minimume 300 BEF aŭ 15 NLG antaŭ la 30-a de septembro 1999,
- 200 BEF por loĝantoj ekster Benelukso; kroma rabato de 200 BEF se vi, ekster-Beneluksano, devas transiri pli ol unu landlimo por atingi Belgion.

Partopreno senkostas por infanoj kiuj ne atingis la aĝon de 6 jaroj kiam la renkontiĝo komenciĝos.

Partatempa partopreno ankaŭ eblas. Bv. anonci vian alvenon kaj foriron. Kotizo laŭ via partopreno al manĝoj kaj restado.

Kelkajn semajnojn antaŭ la komenco de la renkontiĝo vi ricevos duan informilon kun vojpriskribo kaj aliaj praktikaj detaloj.

Vi ankaŭ povas aliĝi per Interreto:

<http://huizen.dds.nl/~nej/a-r.html>

Sendu vian aliĝilon al, aŭ petu pliajn informojn ĉe:

Fabien van Mook
Molenstraat 46c
NL-5701 KG Helmond
rete: nej@dds.nl
tel/faks: +31-492-521991

En Belgio petu informojn ĉe Myriam Van der Steen, tel. +32-16-449339, rete: myriam.belgio@esperanto.nu.

aliĝilo →

Persona nomo:

Familia nomo:

Strato+numero, poŝtkodo, loko:

.....

.....

Lando:

Telefono:

Retpoŝtadreso:

Naskiĝdato: Mi estas ina, malina.

Mi manĝas vegetare viande.

Mi jes, ne membras en NEJ/FLEJA/landa e-ista junularo.

Mi partoprenos tuttempe, parttempe, nome

Mi antaŭpagis NLG/BEF al

nederlanda ĝirkonto 2083695 de Nederlanda Esperanto-

Junularo en Amsterdamo;

belga ĝirkonto 000-1626639-46 de Penn-NEJ en A'damo;

UEA-konto NEJA-P;

..... kontante.

Mi pagos surloke.

Mi bezonas invitleteron por vizo al Belgio.

Mia pasportnumero

estas: Mia naskiĝurbo/-vilaĝo estas:

Bv. indiki en la invitletero la vizitan periodon:

Evt. deziroj/ofertoj gastigi/kontribuoj al programo:

.....

Dato: Subskribo:

La Jefe-Butik'

espéranto
Jeunes

La Jefe-Butik'
4 bis rue de la Cerisaie
75004 Paris

Vi povas
mendi ĉiujn
varbilojn,
broŝurojn,
dosierujojn,
panelojn...
ĉe UFE.



Prezo (inter krampoj: por Jefe-membroj)

..... Libroj

IMO (de Markos)	:	38	x	=
Arnau-komiksoj* (2 albumoj)	:	60 (55)	x	=
Arnau "La bona etoso"	:	27	x	=
La Danĝera Lingvo	:	195 (150)	x	=
Fratoj eble ni estas	:	36	x	=
Assimil libro+kasedoj	:	400	x	=
Asteriks ĉe la Olimpiaj ludoj	:	70	x	=
Asteriks kaj la Normanoj	:	70	x	=

..... Informadiko

E-Karaktraro (por PC)	:	50	x	=
KD-rom ludo Billy (por PC)	:	200 (150)	x	=

..... Vestaĵoj

Ŝvit-ĉemizo esperanto S, M, L, XL**				
(hel-flava, malhel-verda, griza)	:	190 (160)	x	=
T-ĉemizo esperanto M, XL** griza:	:	70 (65)	x	=
blanka:	:	60 (55)	x	=
Kaskedo Festo (blanka, ruĝa, blua):	:	35 (30)	x	=

..... Muziko

Kompakt-disko Vinilkosmo 1	:	120	x	=
Kompakt-disko Vinilkosmo 2	:	120	x	=
Kompakt-disko Jacques Yvart	:	79	x	=
Kompakt-disko Persone	:	79	x	=
Kompakt-disko Jomo	:	79	x	=
Kompakt-disko Solotronik	:	79	x	=
Kompakt-disko Kajto	:	79	x	=
Kompakt-disko La Porkoj	:	79	x	=

Kolekto 2000

..... Diversaĵoj

Pasporta Servo (1999)	:	80 (70)	x	=
Zonsaketo Festo (verda, ruĝa, blua)	:	35 (30)	x	=
CERL-Logopinglo	:	20 (15)	x	=
Malnovaj JeunEspéranto Info	:	25 (20)	x	=
Receptareto pri ĉokolado	:	25 (20)	x	=
Receptareto pri munĝetado	:	25 (20)	x	=
Receptareto pri fromaĝo	:	25 (20)	x	=
Dokumentejo nigra/verda	:	50 (45)	x	=

Sendokostoj : + 15

*bonvolu atesti, ke vi estas plenkreska

Sumo :



Ne forgesu kunmeti ĉekon, kaj skribi vian adreson ĉi-sube !

****Grandeco : _ Koloro : _**

Nomo : _____

Adreso : _____

Tel : _____

TYPES DE COTISATIONS	- de 30 ans				+ de 30 ans (parrains)			Abonnement seul
	JEFO	JEFO+TEJO/UEA	JEFO+UFE	JEFO+TEJO/UEA+UFE	JEFO	JEFO+TEJO	JEFO+UFE	
Tarif normal en FRF	170	310/490*	320	460/640*	170	550	490	170
Tarif réduit (étudiants, chômeurs, appelés) en FRF	100	240/420*	250	390/570*	-	-	-	-
Tarif normal en euros	25,92	47,26/74,7*	48,78	70,13/97,57*	25,92	83,85	74,7	25,92
Tarif réduit (étudiants, chômeurs, appelés) en EUR	15,24	35,59/64,03*	38,11	59,46/86,90*	-	-	-	-
Donne droit à :								
Accès gratuit aux cours organisés par JEFO	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓	
Tarif privilégié pour les rencontres organisées par JEFO	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓	
Réductions sur la JEFO'butik	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓	
Tarif préférentiel Pasporta Servo	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓	
Droit de vote à l'assemblée générale de JEFO	✓	✓	✓	✓				
Revue JeunEsperanto Info (Trimestriel-France)	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓
Revue TEJO Tutmonde (Trimestriel-Monde)		✓		✓		✓		
Revue Konkize (Bimestriel-Europe)	✓	✓	✓	✓	✓	✓	✓	
Revue Franca Esperantisto (Mensuel-France)			✓	✓			✓	
Bulletin Okazas (Mensuel-France)			✓	✓			✓	
Droit de vote à l'assemblée générale de UFE			✓	✓			✓	
Jarlibro (Annuaire des délégués de UEA)		✓		✓				
Revue Kontakto (Trimestriel-Monde)		✓		✓		✓		
*Revue Esperanto (Mensuel-Monde) si cotisation la plus élevée		✓		✓				
Formule(s) choisie(s) (cochez) :								
Adhésion «sympathisant» :	FRF (minimum 30 FRF/4,57 EUR)							
Don à Jefo :	FRF							
Commande(s) Jefo Butik' :	FRF							
TOTAL :	FRF							

A remplir :

M/Mme/Mlle (rayez les mentions inutiles)

Nom nomo

Prénom antaŭnomo

Adresse
..... adreso

Code postal poŝtkodo

Ville urbo

Pays lando

Date de naissance naskiĝdato

Téléphone telefono

Télécopie faks'

Adresse internet
..... retadreso

Profession profesio

INFORMATIONS IMPORTANTES :

- **JEFO** = Junulara Esperantista Franca Organizo : organisation des jeunes espérantophones français ou **Esperanto-Jeunes**. JEFO est affiliée à la fois à TEJO comme «section nationale» et à UFE comme «section jeunes». L'adhésion s'entend de octobre à septembre ou de avril à mars.
 - **TEJO** = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo : organisation mondiale des jeunes espérantophones, affiliée à UEA comme «section jeune».
 - **UFE** = Union Française pour l'Espéranto ou **Esperanto-France**, affiliée à UEA comme «section nationale»
 - **UEA** = Universala Esperanto Asocio : association mondiale pour l'espéranto
 - **Pasporta Servo** : guide d'adresses pour être hébergé gratuitement dans le monde entier lors de voyages à l'étranger, édité par TEJO.
 - **Jarlibro** : guide mondial de tous les délégués d'associations ou clubs locaux d'espérantophones, édité par UEA. Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans.
- Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.
- L'adhésion est valable pour 4 trimestres, à compter de la date d'adhésion. Vous recevrez les numéros de *JeunEsperanto Info* et *Koncize* du trimestre en cours.

- Si vous souhaitez que vos coordonnées restent confidentielles, cochez la case suivante :

Chèque postal, bancaire ou mandat-lettre à l'ordre de "Esperanto Jeunes" à joindre à ce bulletin d'adhésion à : **J.E.F.O. 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS**

La Krokodileto

Ni serĉas artikolojn vere facilajn kaj mallongajn por meti en la paĝo Dokumento (povas temi pri io ajn pri kio vi interesiĝas: sporto, besto, ktp...). Proksimume 10 linioj. Artikolojn por la novaĵoj el la mondo (3 linioj por ĉiu novaĵo). Ludojn (krucvortoj, io ajn porinfanaj ludoj). Poeziojn, kantojn, ktp...



Ni aperigas unue la verkaĵojn de la infanoj, sed kelkfoje ili alvenas tro malfrue. Ni konservas ilin por la venontaj numeroj.

Sendu viajn kontribuojn antaŭ la 10-a de decembro por la numero 8 aŭ antaŭ la 10-a de marto por la numero 9. Estas

ĉiam tri monatoj intertempe.

Se vi deziras ricevi ekzempleron de la revuo, sendu vian adreson al la redakcio kun unu respondkupono aŭ poŝtmarko. Kompreneble, se vi sendas kontribuojn, vi ricevos la sekvantan numeron senpage.

Redakcio : Catherine Giangrossi
1, rue Trarieux, 69003 Lyon
La.Krokodileto@esperanto.org

Nova Esperanto-kurso

De même que l'année passée, un cours d'espéranto commencera en Octobre à l'Association Philotechnique (Paris), chaque vendredi soir.

Il s'agit d'un cours pour débutants selon la méthode directe (méthode Cseh : on ne parle qu'en espéranto). Les gens qui ont déjà des notions d'espéranto sont bienvenus également, surtout les jeunes. Les gens qui connaissent bien l'espéranto sont acceptés mais seulement à titre d'observateurs ou d'aides.

Pour de plus amples informations, reportez-vous à :

<http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo/fr/ass-phil.htm>
 (tél.: 01 43 54 36 20)

NB : Le cours pourrait ne pas avoir lieu si le nombre d'inscrits est trop faible. Dans ce cas votre cotisation vous sera remboursée à condition (1) de ne pas être inscrit à d'autres cours, (2) d'en faire la demande dès l'annonce de la suppression du cours.



Marc

"Libere de la Konoj"

... ĵus aperis

Karaj gelegantoj, antaŭnelonge eldoniĝis kompleta verko de la saĝulo Krishnamurti, unuafoje en Esperanto. Verŝajne, plej multaj el vi neniam aŭdis pri tiu aŭtoro kaj ĉefe preleganto tra la tuta mondo, ĉar vi estas juna, senĉese studas por akiri diplomojn, aŭ ĉar vi ne havas tempon aŭ ne ŝatas legi. Sed aliflanke, ĉar vi estas juna, eble vi havas revolucieman spiriton kaj ŝatus, ke la mondo iel ŝanĝiĝu, espereble por pli da paco, justeco, amikeco kaj feliĉo.

Efektive tia mi estis antaŭ dek jaroj, kiam mi malkovris tiun saĝulon, Krishnamurti, kaj mi ŝatis lian pensmanieron, ĉar li ne proponas perfortan revolucion por ŝanĝi la mondon, sed individuan, personan, internan, spiritan revolucion, kiu tutcerte

pli efikus. Por tio ni unue devas liberiĝi de ĉiuj influoj kaj subinfluoj de nia pasinteco, familio, kulturo, socio, religio, ktp. por vere bone kompreni la mondon, esti tute memstara, ĉiam kun freŝa kaj malfermita spirito, kaj tiel pli efike kaj deinterne plibonigi la socion.

Se tiaj temoj interesas vin, vi povas pliprofundigi ilin legante tiun libron, kiu ĵus aperis, kaj kiu titoliĝas "Libere de la Konoj". Ĝi estas aĉetebla kontraŭ 51 FRF (plus 8 FRF da sendokostoj), se vi mendas ĝin al :
 Yves Bachimont, 106 rue d'Orléans, 14000 Caen,
 tel : 02.31.75.15.74 ;
 retadreso :
 YBachimont@esperanto.org



Esperanto~staĝo + Teatra Vespero

(16-17 / 10 / 1999)

Saluton al ĉiuj,

Eble kelkaj el vi jam aŭdis pri la Esperanto-staĝo organizita de la regiono Orienta Francio. Ĝi okazos la 16an kaj 17an de oktobro 99 en Plainfaing, malgranda vilaĝo en vojeza montaro.

Kial veni al Plainfaing ?

- Por ĝui la naturon, la kvar diversnivelaĵojn kursojn (A1 por infanoj, A por komencantoj, B konversacia kurso aŭ C "Esperanto per videobendoj kaj muziko") aŭ la seminarion D : "Ĉu ekologio iĝos vivstilo por la tria jarmilo ?"

- por la neforgesebla **DISTRA PROGRAMO** : la nun fama teatra grupo de Lyon venos al Plainfaing por prezenti duonhoran spektaklon. Ĝi estos nia antaŭ-lastata prezentado de la teatraĵo de Oscar Wilde "La Graveco de la Fideleco", kiu jam ricevis grandegan aplaŭdon en Saint-Etienne !!

La organizantoj tre ŝatus, se multaj junuloj partoprenus... tial la aliĝkotizo estas senpaga por ĉiuj junuloj (ĝis gajno de salajro !)

Cetere la gasto-kostoj en kompleta pensio estas bedaŭrinde iom altaj :

311 FF por la semajnfino (de sabate 13h30 ĝis dimanĉe 16h).

Se vi loĝas malproksime vi povas veni pli frue : pluraj esperantistoj de la regiono pretas GASTIGI junulojn vendrede vespere por tiu okazo.

Se vi ne deziras partopreni la kursojn, vi rajtas tamen aliĝi. Estos aliaj eblecoj : promenadoj, vizitoj... La Lionanoj eble ankaŭ ne partoprenos la kursojn. La organizantoj nur deziras, ke ni manĝu kune por pli bona etoso. Cetere partatempa partopreno eblas.

Kiun kontakti ? Kiel aliĝi ?

Kontaktu S-inon Ginette Martin,
92 rue du Riant Coteau
88290 Saulxures-sur-Moselotte

Sendu aliĝslipon (kun nomo, antaŭnomo, adreso, elektita kurso, pagenda sumo) kaj ĉekon je la nomo de S-ino Martin al ĉi-supra adreso.

Por informoj pri vendreda gastigebleco, demandu ankaŭ Ginette.

Por pli da informoj pri teatro en esperanto, kontaktu min.

Gxis revido !

Rozenn

Retangulo

* La Krokodileto

La porinfana gazeto "La Krokodileto" havas nun TTT-ejon, kiu prezentas la gazeton kaj donas nemalhaveblajn informojn pri ĝi

<http://perso.easynet.fr/~leo/kroko>

* KoToPo

La TTT-ejo de Kotopo nun denove estas aktuala, kun la nova teksto decidita de la komitato de "Mille et Une Langues". Vi povas legi la paĝojn ĉe :

<http://ttt.esperanto.org/internacia/kotopo>

Venu, vidu, radŝuu

Pri la famaj promenadoj per radŝuoj en la ĉefurbo mi jam aŭdis paroli kvankam mi ankoraŭ ne loĝis en Parizo. Sed kiel ili vere aspektas? Tion mi volis nepre scii.

Ŝatante kaj rapidajn mediprotektantajn netrafikobstrukcajn veturrimedojn kaj glit-sportojn mi aĉetis porrapidecajn radŝuojn. Bremsi kaj turni unue mi lernis dum vesperoj sur placoj aŭ stratoj kaj ankaŭ per rigardo de aliaj radŝuantoj.

Iom post iom kaj post kelkaj negravaj faloj alvenis la tago kiam mi decidis partopreni en per-radŝua promenado dum dimanĉo. Je la dek kvara horo ĉiudimanĉe amasiĝas centoj da radŝuantoj sur la placo "la Bastille" je kvindek metroj for de la sidejo de JEFO.

La promenadon organizas asocio kiu nomiĝas "Rollers et Coquillages". Dum la promenado ankaŭ per radŝuoj policistoj nin akompanas. La normalan trafikon ili kompreneble malpermesas kun la helpo de la organizantoj por la plezuro de la radŝuantoj. Jupi! Tre agrable estas radŝui sur la larĝaj avenuoj kaj bulvaroj sen la ĝeno aŭtomobila senĉesa.

Tiaj promenadoj estas vere spektakloj kaj por la partoprenantoj kaj por la nepartoprenantoj. Kelkaj radŝuantoj estas fulmrapidaj. Vidante ilin plirapidiĝi sur vojoj irantaj malsupren, komecanta radŝuanto povus sin demandi ĉu tiuj bolidoj zorgas pri siaj vivoj! Ja distraĵoj estas tiuj promenadoj sed malfeliĉe laŭ mi ne depostulaj kvankam oni ankaŭ agas per balaĵoj. Mi devus diri "ne sufiĉe depostulaj". Manifestacioj estas or-

ganizataj (de la asocio "Chiche!" proksima de la Verdanoj) ĉiun unuan sabaton de la monato sed nur kelkaj dekoj da radŝuantoj kaj biciklantoj subtenis ilin la sesan de februaro. Kial ekzistas tia diferenco inter la dimanĉa promenado kaj la sabata malpli ofta manifestacio malfermata al ĉiuj biciklantoj kaj radŝuantoj kiuj volas promocii la uzon de tiuj veturrimedoj kontraŭ la aŭtomobila invado. Ĉu manifestacioj organizataj de asocio kiu politike agas timigas la gejunulojn kaj pli ĝenerale la homojn? Tamen temas nur pri la subteno de iuj veturrimedoj kaj ne

pri aro de politikaj ideoj kiujn la asocio havas, ĉu ne? Kia ajn estas via opinio pri manifestacioj, dum dimanĉa promenado, venu, vidu, kaj radŝuu!

Ugo



Comment dit-on en français ... ?

Petit lexique de l'informatique et de l'Internet

Voici les équivalents français de quelques mots que l'on emploie souvent dans le domaine de l'informatique (en anglais, évidemment). A vous de choisir maintenant si vous préférez parler anglais ou français!

- * (access) provider = fournisseur d'accès.
- * browser = logiciel de navigation, navigateur
- * chat = causerie
- * cookie = témoin (de connexion), mouchard
- * cracker = pirate
- * Digital Versatile Disk (DVD)

- = disque numérique polyvalent
- * frame = cadre
- * hacker = fouineur
- * hotlist = liste de signets
- * homepage = page d'accueil
- * newsgroup = forum
- * plug-in = module d'extension
- * smiley = frimousse (ou binette, au Québec)
- * viewer = visionneur
- * webmaster = administrateur de site, de serveur
- * webpage = page sur la toile
- * web site = site de la toile, sur la toile
- * World Wide Web = toile, toile modiale, toile d'araignée mondiale



Ni legu Esperante !

La parokestro de Cucugnan

Pastro Martin estis la parokestro... de Kukunjan. Bona kiel pano kaj vera kiel oro, li patrece amis siajn kukunjananojn. Lia Kukunjan estus por li paradizo surtera, se nur la kukujananoj estus donintaj al li iom pli da kontentigo.

Sed, ve ! En lia konfesejo araneoj spinis kaj, la belan tagon de Pasko, la hostioj restis en la fundo de la Sankta Vazo ! La bona pastro pro tio sentis vundon en la koro, kaj ĉiam li petis de Dio la favoron ne morti antaŭ ol li sukcesos revenigi en la ŝafejon la disjetitan gregon.

Nu, vi tuj vidos, ke Dio lin bone aŭdis.

Iun dimanĉon, post Evangelio, sinjoro Martin suriris la katedron ; "Gefratoj miaj, " diris li, "kredu min se vi volas, lastan nokton mi troviĝis, mi, kompatinda pekulo, ĉe la pordo de l'Paradizo. Mi frapis : sankta Petro malfermis al mi.

- Nu, ĉu vi, mia bona sinjoro Martin ? li diris ; Lia bona vento ?... Kaj kiel mi povas helpi al vi ?

- Bela sankta Petro, Vi, kiu skribas en la Grandan Libron kaj tenas la Ŝlosilon, ĉu... -se mi ne tro scivolemas... -ĉu vi povas min diri, kiom da kukunjananoj vi havas en Paradizo ?

- Al vi nenion mi povas rifuzi, sinjoro Martin, bonvolu sidiĝi, ni tuj kune vidos l'aferon.

Kaj sankta Petro prenis sian dikan libron, malfermis ĝin, surnazigis la okulvitrojn :

- Nu ni rigardu iomete. Ĉu Kukunjan vi diris ? Ku..., ku..., Kukunjan, ha, jen ni estas... Kukunjan. Mia bona sinjoro Martin, la paĝo estas tuta blanka. Eĉ ne unu animo... Ne pli da kukunjananoj ol da ostoj en limako !

- Kiel ? Ĉi-tie neniu el Kukunjan ? Vere neniu ? Ne eblas...! Mi petas, pli bone rigardu...

Kaj mi, malfeliĉulo, mi frapis kun la piedoj kaj, kunigante la manojn, mi ĝempetis mizenkordon. Tiam sankta Petro :

- Kredu min, sinjoro Martin, ne tiel suferigu al vi la koron, ĉar el tio povas rezulti malbona sango-premo. Finfine, ne estas via kulpo ! Aŭskultu, viaj parokanoj, ĉi-momente, estas tre verŝajne farantaj etan pun-restadon en la Purgatorio !

- Ah ! Pro kompatito, granda sankta Petro, lasu min almenaŭ ilin vidi kaj konsoli.

- Volonte, amiko mia... Jen, rapide surmetu ĉi sandalojn, ĉar la vojoj estas ne tre belaj. Bone... ĉio en ordo. Nun, iru rekte antaŭen. Ĉu vi vidas, tien for de la vojkurbiĝo ? Dekstramane vi trovos arĝentan pordon, punktitan de nigraj krucoj. Frapu, oni malfermos al vi. Adiaŭ ! Fartu bone kaj vigle...

Kaj mi marŝis... marŝadis...! Vera batuo ! Nura rememoro donas al mi anseran haŭton ! Eta pado; invadita de rubusoj, rebrilantaj karbunkoloj kaj silblantaj serpentoj kondukis min ĝis la arĝenta pordo.
Tok ! Tok !

- Kiu frapas ? Plende laŭtis raŭka voĉo.

- La parokestro de Kukunjan.

- De kie ?

- De Kukunjan.

- Ha ! Envenu !

Mi eniris, granda bela anĝelo, kun flugiloj nokte-nigraj, robo taglume brila; kun diamanta ŝlosilo pendanta ĉe-zone skribadis, skrib'... skrib'... en grandan libron, pli dikan ol tiu de sankta Petro.

- Finfine, kion deziras vi kaj kion vi demandas ? Diris la anĝelo.

- Bela anĝelo de Dio, mi volas scii... -eble mi estas tro scivolema... Ĉu tie-ĉi vi havas la kukunjananojn ?

- La... ?

- La kukunjananojn. La anojn de Kukunjan. Ja ilia parokestro estas mi.

- Ha... Pastro Martin, ĉu ne ?

- Por via servo, Sinjoro Anĝelo.

Kaj la anĝelo malfermis kaj tralegis la grandan libron, humidigante per salivo la fingron, por ke la folio pli facile moviĝu.

- Kukunjan, diris li eligante longdaŭran suspiron... Sinjoro Martin, ni havas en Purgatorio nenium el Kukunjan.

- Jesuo ! Maria ! Jozefo ! Neniu el Kukunjan en Purgatorio ? Ho, bona Dio ! Kie do ili estu ?

- Nu, sankta viro, ili estas en Paradizo. Kie diable vi volas, ke ili estu ?

- Sed...de tie mi venas... de la Paradizo...

- De tie vi venas ? Nu kio ?

- Nu ! Ne tie ili estas ! Ah, bona Patrino de la anĝeloj !

- Nu, sinjoro parokestro, kiel diri ? Se ili estas nek en paradizo, nek en purgatorio, ili povas esti nur...

- Sankta Kruco ! Jesuo, Filo de David ! Oj, oj, oj ! Ĉu eblas ? Ĉu mensogis granda sankta Petro ? Mi tamen aŭdis nenium Kokokrion ! Oj povraj ni. Kiel mi povos

eniri al Paradizo, se miaj parokanoj ne estas tie ?

- Aŭskultu, mia povra sinjoro Martin, tial, ke vi volas esti tutcerta pri tia ĉi afero kaj ĉion vidi propraokule, sekvu ĉi vojeton, iru kurante se tion vi kapablas... Vi trovos, maldekstre, grandan pordegon. Tie vi informiĝos pri ĉio. Dio vin gardu !

Kaj la anĝelo fermis la pordon.

Estis longa pado, tute pavimita el ruĝa karbo. Mi ŝanceliĝis, kiel ebriulo kaj stumblis ĉiupaŝe ; mi estis ŝvitkovrita, ĉiu korpoharo mia havis sian guton kaj mi anhelis pro soifego... Sed, iele, dank' al sandaloj pruntedonitaj de l'bona sankta Petro, miaj piedoj ne brulis.

Post multaj mispaŝoj, mi vidis maldekstramane pordon... ne... pordegon... enorman pordegon faŭkantan kiel pordon de fornego. Ah, infanoj miaj, kia spektaklo ! Tie, neniŭ demandis pri mia nomo, tie neniŭ registro... Tien oni eniras tute libere kaj multope , fratoj miaj, same kiel dimanĉe vi eniras la kafejon !

Mi ŝvitis dikajn gutojn kaj tamen frostotremis samtempe. Miaj haroj hirtiĝis. Mi flaris brulaĵon, rostantan karnon, ion similan al odoro ŝvebanta en nia Kukunjan, kiam Eloy, la hufoferisto, bruligas, por ĝin ferumi, la hufon de maljuna azeno. Mi perdis la spiron en tia fetora aero brulanta, mi aŭdis hororigan kriadon, ĝemojn, hurladojn kaj blasfemojn.

- Nu ? Ĉu eniras ĉi aŭ ne ? krias al mi kornohava demono, samtempe pikante min per sia forkego.

- Mi ? Mi ne eniras. Mi estas amiko de Dio.

- Ci estas amiko de Dio ? Tiam, kion ci umas tie-ĉi, skabia hundo ?

- Mi venas... Ah, ne demandu min, ke mi preskaŭ ne plu kapablas stari !... Mi venas... venas de malproksime... humile peti al vi, ĉu... ĉu, tute hazarde... vi ne havus ĉi-tie iun el Kukunjan ?

- Oj, Dia Fajro ! Ĉu rolas ci stul-

tule ! Kiel ci ne sciis, ke Kukunjan entute estas ĉi-tie ? Vidu, malbela korvo, rigardu bone, kaj ci vidos kiamaniere ni aranĝas ilin tie-ĉi, ciajn famajn kukunjananojn !

Kaj tie, meze de teruraj flamliradoj, aperis al mi :

La granda Kok-Galino - vi ĉiuj konis lin, miaj fratoj - Kok-Galino, kiu tiom ofte ebriiĝis kaj samofte bategis sian povran Karan. Kaj Katerineta, tiu eta malvirtulino kun la nazo ĉielcelanta... kiu dormis tute sola en la garbejo. Vi certe memoras tion, miaj sentaŭguloj ! Sed ni iru plu, mi jam tro diris.

Aperis ankaŭ Paskalo Glu-Fingro, kiu faris sian oleon el la olivoj de sinjoro Juliano !

Kaj Babeta, la spikumistino, kiu spikumante, plirapidigis la rikolton per ŝtelantaj manoj ĉe la jam pretaj garboj. Kaj mastro Grapasi, kiu tiel zorgeme oleis la radon de sia ĉarumo... Kaj Delfina, kiu tiom kare vendis la akvon de sia puto...Kaj la Tordulo, kiu, kiam li renkontis min portantan la Bonan Dion, paŝis tute rekte, kun kaskedo surkape, pipo en beko kaj aroganta kiel virparo, ĝuste kvazaŭ li renkontus hundon ! Kaj Kulo kun sia Zeta, kaj Jako, kaj Petro, kaj Toni kaj...tiel ne plu...?



Kortuŝitaj, blank-vizaĝaj pro timo, la aŭskultantoj ĝemis, vidante, en la faŭkanta infero, tiu-ĉi sian patron, alia la patrinon, tiu la avinon, alia la fratinojn...

" Vi bone sentas, gefratoj miaj," diris la bona patro Martin, "vi bone sentas, ke tia afero ne povas pludaŭri. Mi respondecas pri animoj. Mi volas vin savi el abismo, kien vi ĉiuj estas ruliĝantaj kun la kapo antaŭen ! Morgaŭ,

ek al la tasko, ne pli malfrue ol morgaŭ ! Kaj certe ne mankos la laboro ! Jen kiel ni agos : por ke ĉio iru glate, necesas laŭorde agi. Ni iros vicon post vico, kiel en dancejo !

Morgaŭ lundon : mi konfesprenos la geoldulojn. Eta afero. Mardon : la infanojn. Rapidu farite.

Merkredon : la knabojn kaj knabinojn. Povas esti iom longtempa.

Jaŭdon la virojn.

Ni rapide tranĉos

Vendredon : la

virinojn. Mi diros

: Neniŭ fuŝado !

Sabaton : la mueliston. Unu tago ne estos tro por li sola !

Kaj, se dimanĉon ni finos, ni ja estos feliĉaj ! Vidu, infanoj miaj, kiam matura estas la tritiko, necesas ĝin falĉi ; kiam la vino estas en la poto, jen la tempo ĝin trinki. Ni havas sufiĉe da malpuraj tolaĵoj : nun ni lavu ilin, kaj eĉ ĝisfunde tralavu. Jen la graco, kiun mi deziras al vi ĉiuj. Amen ! "

Tiel dirite, tiel farite ! Oni finpretigis la lesivon. Kaj ekde tiu memorinda dimanĉo, la aromon de la virtoj ŝvebantaj el Kukunjan oni povas spiri en la ĉirkaŭo je distanco dek-leŭga ! Kaj la bona pastro s-ro Martin, feliĉa kaj ĝojplena, iun nokton sonĝis ke sekvata de sia tuta grego, li surgrimpis, en belega procesio, meze de lumigitaj kandeloj, odoranta incens-nubo kaj mes-knaboj kantantaj Te Deum, la lum-plenan vojon al la urbo de Dio. Kaj jen la rakonto pri la parokestro de Kukunjan, tia, kian ordonis ke mi rakontu al vi tiu granda sentaŭgulo Roumanille, kiu mem aŭdis ĝin de alia bona kunulo.

Ekstrakto el " La leteroj el mia muelejo", de A. Daudet
Tradukita de Camille Biumal
Publikaĵo el France Esperanto

Demandes de correspondants

Vandilson da S. TRINDADE
Rua da Glória, 260 Periperi 40725-650 Salvador, Bahia - Brasil

esperanto@svn.com.br

Mi estas 19-jara. Instruanto de Esperanto en Bahia Esperanto Asocio (<http://www.svn.com.br/abe>) kie mi helpas organizi Esperantan movadon de Bahia, nia ŝtato. Mi ankaŭ parolas angle, kaj studas la francan, kaj la germanan.

Mi ŝatus korespondi pri: lingvoj, historio, turismo, ĝeneralaj aferoj, tutmonda Esperanta Movado, religioj, kaj tiel plu.

Jesus BARAJAS
Mahopac, NY, Usono

jmb486@psu.edu

Mi estas 17-jara viro, komencanto.
Mi loĝas 100 km norde de Novjorko urbo.
Mi ĉeestos Pennsylvania Stata Universitaton en aŭgusto.

Kabindra Raj Shakya
P.O.Box 10128
Kathmandu, Nepal.

maitreya.karmicwisdom@bluewin.ch
Vajrakabin@hotmail.co
Vajrayanas@hotmail.co

Mi estas fraŭlo 27-jara, memlernanto de la jaro

1992, kaj nun mi parolas iomete bone!

Interesoj: vojaĝado kaj gastigado, naturo kaj meditado, lingvoj kaj la homoj estas miaj ŝatokupoj.....

Maria KINGSLEY
1626 Eustis St. #11
Lauderdale, MN 55108
Usono

walosi@hotmail.com
mtk@sitinvest.com

Mi estas 26-jara virino, edziĝita de sep jaroj. Mi lernis Esperanton antaŭ kelkaj semajnoj. Mi komencis lerni Esperanton ĉar mi pensis ke mia cerbo putriĝos pro ne uzado.

Interesoj: Noveloj de C.S. Lewis, kiel Narnia. Mi ŝatas simpligi domajn taskojn, kaj trovi pli malmultekostan manĝmanieron.

Mi ŝatas legi, diskuti, fiksi librojn, kaligrafio (ambaŭ mane), piedpromenado.

Mi preferas paperpoŝton, sed mi ankaŭ akceptos ret-poŝton.



Nikolai ŜNIRJOV
Ul. Belinskogo 1-314
Krasnojarsk, RU
660032, Rusio

12-jara knabo, hobiaj estas sporto, bildkartoj, kalendarretoj, fotoj.

Trinidad Perez Lopez
strato Extramuros, 20,
ES-12413 Castellново
(Castellon), Hispanio

Mi estas 22-jara kaj komencanto. Mi studas entreprenadon en la universitato en Valencia. Mi deziras korespondi pri muziko, sporto, vojaĝoj, kino, ...

Mimoza IVOKU
Pallati 2. Ykalla
4. Iozevice-Lezhe,
Albanio.

Mi estas 18-jara, albana junulino. Mi volas konatiĝi, amikiĝi kun fremdaj familioj en okcidentaj landoj. Mi volas plus-tudi en altlernejo, do mi petas senpagan loĝadon ĉe tiu familio, rekompence mi pretas oferti miajn servojn en hejmaj taskoj kaj mian amikecon.

Jurgita Andvinekoite
V. Kreves 100-511,
Kaunas, LT-3041,
Litovio.

Mi estas 17-jara lernan-

tino. Mi deziras korespondi pri ĉiu temo kaj interŝanĝi bildkartojn.

Vladimir Konovalov
ul. 9 Maja 39-153, Krasnojarsk, RU-660118,
Rusio.

13-jara knabo, hobiaj estas sporto, modeletoj de aŭtoj, komputilaj ludoj, moneroj.

Ana Maria Perez Ramirez
C/ Concejo, 4 ES-46320
Sinarcas (Valencia)
Hispanio

Studentino de filologio,
24-jara .

Ivan POLOVNIKOV
ul. Semaforaja 201-143,
Krasnojarsk, RU-660012,
Rusio.

13-jara knabo ŝatus korespondi kun geknaboj de la sama aĝo.

Toni Tormos Lopez
strato Espartero, 1, Pta. 6,
ES-46900 Torrent
(Valencia), Hispanio.

Mi estas komencanto en Esperanto kaj 20-jara. Mi studas historion en la universitato en Valencia. Mi deziras korespondi pri landoj, kutimoj kaj pri historio.

Quelques-unes des prochaines rencontres

OKTOBRO

02 - 09 octobre

—> Espagne (Cambrils)

◆ 7-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, Cambrils.

Inf: H.F.E.A, apartado 15027, ES-08080 Barcelona, Hispanio.

Tel: +34-(9)3-7253421, +34-(9)3-7275021, fakso: +34-(9)3-7836511. luis_serrano@mixmail.com

22 - 24 octobre

—> Belgique (Nieuwpoort)

◆ PSKK (Post-Somera Klaĉ-Kunveno. Plej Senenua Klaĉ-Kunveno, Plenetosa Stranda Klaĉ-Kunveno, ktp).

Rencontre traditionnelle post-estivale "PSKK" des associations néerlandaise et belge de jeunes espérantophones. A 100 mètres à peine de la mer ! Au programme, donc, ... baignades, ainsi qu'une excursion à Oostende.

Inf: Fabien van Mook, Molenstraat 46c, NL-5701 KG Helmond, Nederlando.

Tel/fakso: +31-492-521991. Rete: nej@dds.nl

24 - 31 octobre

—> France (Strasbourg)

◆ Séminaire de TEJO au Centre Européen de la Jeunesse de Strasbourg, sur le thème "Internationalisme et nationalisme - idées contradictoires ou qui se complètent ?" Cotisation de seulement 280 FRF, frais de voyage remboursés, et hébergement et restauration assurés sur place par le Centre Européen de la Jeunesse !

Inf: Grigorij L. Arosjev, a/ja 31., RU-117071 Moskvo, Rusio.

Tel: +7-095-4761472.

Rete: arosjev@fnmail.com



29 - 01 octobre-novembre

—> France (Sète)

◆ 5-a Mediteranea Konferenco de Esperantologio. La esperanta fonetiko kun Daniele Vitali.

Inf: LF-Koop, C. P. 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio

30 - 01 octobre - novembre

—> Catalogne (Manresa)

◆ 29-a Kataluna kaj 2-a Transpirenea Kongreso de Esperanto.

Inf: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08280 Sabadell (Katalunio), Hispanio. Tel/fakso: +34-93-7163633.

Rete: kea@stel.net

NOVEMBRO

06 - 07 novembre

—> France (Morbecque)

◆ Nordfranca Eŭropa Rendevuo.

Inf: Jean Dietrich, 104 rue J. Jaurès, FR-59192 Beuvrages.

Tel: +33-3-27337931

27 novembre

—> Pays-Bas (Rotterdam)

◆ Portes ouvertes au siège de UEA, Association Mondiale d'Espéranto

Inf: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Tel: +31-10-4361044, fakso: +31-10-4361751.

Rete: uea@inter.nl.net

DECEMBRO

10 - 15 décembre

—> France (Bouresse)

◆ Traditionnelle semaine "Zamenhof". Le centre culturel d'Espéranto "La Kvinpetalo" est situé dans un village tranquille, au milieu d'une région riche en monuments romans. Pendant le séjour, entre les cours et les

stages, il est possible de se reposer dans un parc ou de se promener sur les chemins et sentiers...

Inf: Esperanto-Centro "Kvinpetalo"

FR-86410 Bouresse

tél. + fax : +33 (0)5 49 42 80 74

rapley@club-internet.fr

27 décembre - 03 janvier

—> Allemagne (Münster)

◆ 16ème festival international (IF), plus particulièrement pour les jeunes familles et les personnes de 25 à 55 ans.

Inf: Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio.

Tel/fakso: +49-5624-8007, poŝ-tel: +49-171-4964558


27 décembre - 03 janvier

—> Allemagne (Wetzlar)

◆ 43-a Internacia Seminario, 43ème IS : "Semaine/Séminaire International" de GEJ, association allemande des jeunes espérantophones. Le thème sera "Un millénaire se termine - qu'y a-t-il derrière nous ?". L'IS (prononcez : lisso) est la plus grande rencontre internationale de jeunes espérantophones, avec en général 300-400 jeunes de 35-40 pays. N'importe quel participant pourra vous le confirmer : c'est LA RENCONTRE À NE PAS MANQUER !!! Pour l'anecdote : la dernière nuit de l'année, chaque nationalité participante fête le nouvel an à l'heure de son propre pays... ambiance garantie jusqu'au petit matin !

Inf: Germana Esperanto-Junularo, Grellstr. 36, DE-10409 Berlin, Germanio. Tel/fakso +49-30-42857899

Rete : is.admin@esperanto.de



Viaj kontaktoj ĉe JEFO / Vos contacts chez Espéranto-Jeunes

Same kiel por ĉiuj asocioj, la komitato de JEFO elektas estraron. La lokajn kontaktojn tenas niaj regionaj kunordigantoj (vidu ĉi-suban mapon). Aliaj aktivuloj havas rolon komisiitan de la komitato. Tiu ĉi paĝo prezentas la aktivulojn elektitajn dum la ĝenerala asembleo de 1999-03-13.


Comme pour toutes les associations, le conseil d'administration de JEFO choisit un bureau. Les contacts locaux sont assurés par nos coordinateurs régionaux (voir la carte ci-dessous). D'autres actifs ont un rôle délégué par le conseil d'administration. Cette page présente les actifs élus par l'assemblée générale de 1999-03-13.

Sidejo / Siège social		
Esperanto-Jeunes	4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris	JEFO@esperanto.org http://ttt.esperanto.org/jefo/
Estraro / Bureau		
Karine Texier-Bérizzi (prezidanto/présidente) (CR Île de France)	17 allée Jean-Baptiste Clément 78570 Andrésy	KTexier@esperanto.org t[r]: 01 39 70 78 15 m: 06 13 52 72 41
Bruno Flochon (vicprezidanto/vice-président)	6C av de l'hippodrome 69890 La Tour de Salvagny	BFlochon@esperanto.org t+ff[r]: 04 78 48 00 40 m: 06 60 58 00 40
Didier Loison (kasisto/trésorier) (universités)	45 rue Verrerie 21000 Dijon	DLoison@esperanto.org t[r]: 03 80 50 11 28 (fin de semaine)
Magali von Blottnitz (sekretario/secrétaire) (subventions) (OKEJ)	Lütticher Str. 10 DE-50674 Köln	MvBlottnitz@esperanto.org t: +49-221-5103527
Komitato / Conseil d'administration		
Flavie Audibert (culture)	1 rue Henri Say 92600 Asnières	t+ff[r]: 01 47 93 15 04
Coralie Delnatte (CR Languedoc-Roussillon)	8 impasse de la Gayonne 34500 Béziers	t+f: 04 67 11 20 59 (gepatroj) t: 04 67 10 05 96 (Fred)
Ludivine Delnatte (rédactrice JI)	An der Kittelburg 15 DE-51469 Bergisch Gladbach	LDelnatte@esperanto.org t: +49 2202 22739 f: +49 89 66617 36985
Karine Ducloyer (CR Bretagne)	1 allée de Kernisy 29000 Quimper	KDucloyer@esperanto.org t+ff[r]: 02 98 55 48 16
Alain Fagot (transfert des compétences)	Egelantiersstraat 12 B NL-1015 PL Amsterdam	AFagot@esperanto.org t: +31 20 62 65 509
Cédric Forgeau (monde des entreprises)	8 rue des Hérédiaux 69008 Lyon	CForgeau@esperanto.org t[r]: 04 78 01 15 97
Catherine Giangrossi (enfants et La Krokodileto)	1 rue Trarieux 69003 Lyon	CGiangrossi@esperanto.org t+ff[r]: 04 72 36 07 14 La.Krokodileto@esperanto.org
Dávid Hromada	14 rue Louis Bouchet 93220 Gagny	DHromada@esperanto.org t: 01 43 32 86 78
Émilie Joly	chemin des arènes 13430 Eyguières	EJoly@esperanto.org t+f: 04 90 59 84 90
Pascal Guillemain (CR Centre-Val de Loire)	1 rue Charles Lindbergh 37000 Tours	t: 02 47 61 42 88
Jérôme Mathieu (CR Auvergne)	3 rue Sainte Claire 63000 Clermont-Ferrand	JMathieu@esperanto.org t+ff[r]: 04 73 36 11 20
Vincent Pacheu (CR PACA)	Vallon de la Tour de Keyrié 13100 St Marc Jaumegarde	VPacheu@esperanto.org t: 04 42 24 95 83

Aliaj kunordigantoj / Autres coordinateurs		
Yves Bachimont (CR Basse-Normandie)	106 rue d'Orléans 14000 Caen	YBachimont@esperanto.org t[r]: 02 31 75 15 74
Marc Bavant (cours par Internet et site)		MBavant@esperanto.org
Vincent Charlot (partis politiques)	10 square Savorgnan de Braza 94310 Orly	VCharlot@esperanto.org t[r]: 01 48 92 63 79
Sébastien Erhard (CR Haute-Normandie)	13ter, rue Raymond Botté 76380 Canteleu	t[r]: 02 35 36 18 36
Bruno Ferré (CR Aquitaine)	45 rue Borie 33300 Bordeaux	BFerre@esperanto.org t: 05 57 87 04 58
Erwin Kretz (CR Alsace)	22 rue Berthe Molly 68000 Colmar	t: 03 89 24 98 84
Pascal Lécaille (Solidaraj Tagoj)	BP 3019 69394 Lyon cedex 03	PLecailla@esperanto.org t+f[r]: 04 72 36 07 14 Festo@esperanto.org
Rozenn k Clément Picard (recettes des week-ends gourmands)	8 quai Bondy 69005 Lyon	RPicard@esperanto.org t[r]: 04 72 07 04 19
Laurent Vignaud (CR Pays de la Loire)	3 allée du Haras Appt 132 49100 Angers	LVignaud@esperanto.org t: 02 41 20 19 40 m[r]: 06 12 11 17 82
Violette Walther (TEJO-komitatano A)	1 route de Mackviller 67430 Diemeringen	VWalther@esperanto.org t: 03 88 00 40 71

Mallongigoj / Abréviations				
t = Telefono	f = Faksilo	[r] = Respondilo	m = Poŝtelefono	CR = Regiona Kunordiganto
t = Téléphone	f = Fax	[r] = Répondeur	m = Mobile	CR = Coordinateur Régional

Dernière mise à jour : 1999-09-02




SOLIDARAJ TAGOJ

30 junio - 5 julio 2000 • SAINT-CHAMOND

JEFO jam plurfoje organizis sen-temajn renkontiĝojn (FESTO) sed por la escepta jaro 2000 ni proponas sent-eman aranĝon.

Dum tiu renkontiĝo, ni ne estos nur inter esperantistoj, ĉar ĝi okazos dum festivalo en urbo Saint-Chamond, kiu troviĝas inter Lyon kaj Saint-Etienne. Tiu urbo organizas grandan feston, okaze de la jarmila ŝanĝiĝo, kaj optimisme festos la homaran estontecon, kiu kunigos solidarecajn kaj humanismajn asociojn kaj la lokan loĝantaron.




Jen ŝanco por montri nian specifecon. Jen okazo, ne nur por pripensi pri niaj solidarecaj spertoj, niaj manieroj helpi al aliuloj, sed ankaŭ por kune oferti ion al la mondo kaj al la personoj kiujn ni renkontas.

Tiu ĉi junulara renkontiĝo, kvankam festa kaj bon-etosa, estos momento kiam ni ĉiuj povos debati kaj interŝanĝi pri niaj agadoj en niaj respektivaj landoj, kaj mem kune kaj praktike sperti solidarecon tra unu aŭ du konkretaj projektoj.



La gastejo estas agrabla kaj komforta kun bela vidaĵo. En ok-hektara parko, nia restadejo ofertas ĉiujn eblecojn: tendumejon ene, restoracion, sportejojn, salonojn por niaj oftaj kuniĝoj, ktp. Surloke disponeblas naĝejo, tenisejoj, retpilkejo, petankumejo... Ĉar la gastejo troviĝas rando de nacia parko "Le Pilat", ni povas garantiigi agrablajn promenadojn kaj ekskursojn.



Buso estos proponata ĝis Toulouse por KAFE se estas sufiĉe da interesuloj por vojaĝi de Saint Chamond. KAFE okazos dum la 5 sekvantaj tagoj.

KOTIZTABELO SOLIDARAJ TAGOJ 2000

en EUR	Ĉambro		Tendo	
	kun	sen	kun	sen
Manĝoj:				
ĝis 30/03/2000				
- tarifo A	112	80	75	40
- tarifo B	104	74	69	36
Poste k surloke				
- tarifo A	120	86	81	44
- tarifo B	112	80	75	40

Tarifo B : personoj en malfortaj ekonomioj, senlaboruloj aŭ studentoj

Tarifo A : personoj en aliaj kazoj

- Malrabato por du-lita ĉambro : 10 EUR por ĉiu persono.
- Se vi volas partopreni favorkondiĉe, vi povas aktive proponi programerojn.

Partoprenkondiĉoj :

- por ĉiuj, la matenmanĝo estas inkluzivita en la kotizo.
- tiuj, kiuj ne prenas la opciojn kun la manĝoj povos kuiri en la tenduma loko, kunportante siajn kuirilojn.
- la opcioj kun la manĝado inkluzivas 5 manĝojn (ĉefe vespere).
- la tendumantoj loĝos surloke kaj kunportos sian propran tendon.
- la ĉambroj en la domo estas 2- aŭ 4- ĝis 6-litaj.

Petu vian aliĝilon !

Espéranto-Jeunes 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS - jefo@esperanto.org

espéranto
Jeunes